# Buzsák



# Vilaĝo de popola arto: Buzsák!



La vilaĝo *Buzsák* (prononcu: buĵak) estas 15 km-ojn for de Balatono. Ĝi estas fama pri siaj popolaj tradicioj kaj popolartoj. Precipe la tieaj brodaĵoj, lignoskulptaĵoj, popoldancoj estas vaste konataj. En la romkatolika preĝejo troviĝas unika kolektaĵo de mesmanteloj, popolarte broditaj laŭ la speciala stilo de *Buzsák*.

Apartenas al la kunstruita kultura heredaĵo la vilaĝmuzeo de Buĵak (*Buzsáki Népművészeti Tájház*), la *Blanka Kapelo* kaj krome meritas atenton la banejo *Csisztafürdő* (pron. ĉista-firde)



Komence de la dudeka jarcento preskaŭ la tuta vilaĝo konsistis el kantegmentaj domoj, kaj tiuj domoj havis nur ĉambron, kameron kaj kuirejon sen kamentubo. Sed la domoj baldaŭ fariĝis rekonstruitaj, la kuirejojn oni kompletigis per kamentuboj, do la fumo malaperis el la domoj, kaj ili fariĝis pli komfortaj.

La termura domo, kiu enhavas la popolartan ekspozicion, troviĝas en la centro de la vilaĝo. En 1977, kiam oni aĉetis ĝin, ankoraŭ pluraj termuraj domoj troviĝis en la vilaĝo, sed nuntempe ĝi restis la unusola tia domo, kiu speco iam karakterizis la tutan regionon.

La konstruaĵo de la **Popolarta Vilaĝmuzeo de Buĵak** (*Buzsáki Népművészeti Tájház*) estas kampara domo, konstruita fine de la 19-a jarcento, kaj loĝata ĝis 1974. La tegmenta trabaro antaŭe duone, malantaŭe estas tute oblikva. Ĝiaj muroj konsistas el kompaktigita tero. La tegmento konsistas el kanoj (fragmitoj). La ekstera bildo kaj la instalaĵoj estas adekvataj laŭ la tradicioj de la fino de 19-a jarcento. Laŭlonge de la domo estas duone fermita koridoro.





Ĉe la fronto estas "parada" ĉambro, kiun oni kutime ne uzis, sed tenis en brila ordo, kiel la simbolon de la familia rango kaj bonhavo. Meze estas kuirejo kun "libera" kamenaperturo. Tian kuirejon oni nomis "fumkuirejo", ĉar la kamen-aperturo ne tre bone forkondukis la fumon, do parto el ĝi restis en la ejo. Ĉe la malantaŭa flanko estis la tagnokta ĉambro, kie fakte pasis la vivo de la familio, kaj nuntempe tie troviĝas la popolarta ekspozicio.



La instalaĵoj de la "parada" ĉambro sugestas la tradicion de malnovaj epokoj: skulptitaj seĝoj, lulilo, ĉeangula benko kun tablo, kredenco ornamita per bildoj pri sanktuloj, similaj bildoj sur la muro, krome familiaj fotoj, lignokesto ornamita per popolarte pentritaj tulipoj, litoj kun fojno-matracoj,

kovritaj per dikaj, arte teksitaj kovriloj, superŝutitaj per plumonoj kaj kusenoj.

## *Korto de la muzea domo*

Ĉe la fronta flanko, laŭlonge de la tuta domo troviĝas korto. La iama ĉarejo, fojnejo kaj stalo nuntempe funkcias kiel kudrejo; en la grenejo estas vendejo de memorobjektoj. La konstruaĵon kompletigas ankoraŭ nova ekspoziciejo de malnovaj agrikulturaj laboriloj, ŝirmata liberaera scenejo, kaj tegmentita konstruaĵo kun plurfuncia bakforno.



La korto de la muzea domo estas taŭga por okazigi publikajn aranĝojn, ĉiujare ni okazigas en ĝi la tri plej gravajn: la Tagojn de Pentekosto, la Kermeson de *Buzsák* (do la nomtagon de la katolika preĝejo), kaj la Tagojn de Vinberrikolto. Ĉiu el la tri aranĝoj baziĝas sur folkloro.

Je Pentekosto la programon kompletigas kuirkonkurso kaj vinkonkurso, la Kermeso enhavas ankoraŭ muzikan programeron, kaj en la Tagoj de Vinberrikolto okazas tradicia kavalkado (parada marŝo), en kiu interalie dancistoj, vestitaj per popolartaj vestaĵoj, paradas sur ornamitaj kaleŝoj kaj ĉaroj.

En tiuj aranĝoj la publiko povas ekkoni la popoldancojn de la regiono. Nia vilaĝa popolarta danc-ensemblo *Buzsáki Boszorkányos Néptánc Egyesület* prezentas malnovajn folklorajn tradiciojn, plejparte la dancojn de Buzsák, sed ĝi kelkfoje surscenigas dancojn de ankaŭ aliaj regionoj.

La plej malnova, do elstare valora konstruaĵo estas la *Blanka Kapelo*, kiu estas unu el la belaĵoj de la ekstera teritorio de la vilaĝo. Ĝia konstruado estis grava evento de la regiono, ĉar laŭ la skribaj fontoj en la proksimo estis du praaj hungaraj loĝlokoj (setlejoj), kaj la loĝantoj de tiuj du lokoj en la 13-a jarcento komune konstruis la kapelon.

En la 15-a kaj 16-a jarcentoj, kiam la iamaj loĝantoj formortis, kroatoj ekloĝis ĉi tie.

Ĉirkaŭ la kapelo estas bele prizorgita parko kaj malgranda tombejo. La konstruaĵo de la preĝejo konsistas el longforma navo kaj duonronda sanktejo.



La kapelo originale konstruiĝis el brikoj sen turo, laŭ romanika stilo. La svelta turo estas pli nova konstruaĵo. La preĝejeto estas modeste instalita, en ĝi troviĝas nur simpla altaro kaj ne multaj statuoj. Pli frue al ĝi apartenis ankoraŭ alia altaro, kiun produktis francaj majstroj laŭ popolarta baroka stilo kun riĉaj ornamaĵoj, kaj kiu havis statuon pri Sankta Maria kun ŝanĝeblaj vestaĵoj. Tiu altaro nuntempe estas videbla en la granda paroĥa preĝejo ĉe la vilaĝcentro, kie troviĝas ankaŭ la tuteŭrope fama kolektaĵo de mesmanteloj, el kiuj ĉiu unuopa peco estas ornamita per popolarta brodaĵo laŭ la speciala stilo de Buzsák.

Al ĉiu mesomantelo apartenas konforma vestaĵo por la statuo de Sankta Maria. Okaze de liturgiaj festoj oni vestas per la konforma koloro kaj la preĝejon kaj la statuon de Sankta Maria. Tiuj ornamaĵoj restos sen ŝanĝo ĝis la sekva festo.

Ankaŭ la paroha preĝejo meritas atenton. Pro la antikvecaj sed bele renovigitaj instalaĵoj ĝi estas vidindaĵo vere agrabla por la okuloj. Sur la predika katedro oni vidas historion el la Evangelioj, nome la mirakle abundan fiŝkaptadon. Estas videblaj ankoraŭ malnovaj pentraĵoj kaj mozaikvitraj fenestroj same kun la figuroj de la Biblio. Meze de la altaro oni vidas la ĉieliron de Sankta Maria, ambaŭflanke estas pentraĵoj pri la apostoloj Petro kaj Paŭlo kun glavo, respektive kun la ŝlosilo de paradizo.



La popolarto de Buzsák estas tre kurioza, ja ne ekzistas alia loko, kiu havas tri tute malsamajn stilojn de brodaĵoj. La figuroj de tiuj brodaĵoj estas troveblaj preskaŭ ĉie en la vilaĝo, ĉar ili estis kaj restis la plej gravaj dekoraĵoj de la lokaj publikaj konstruaĵoj.



El la vidpunkto de turismo elstara valoraĵo estas la banejo *Csisztafürdő* (pron. ĉista-firde), kiu troviĝas 5 kilometrojn for de la vilaĝo. Ĉiujare dekmiloj da homoj vizitas ĝin pro ĝia kuracakvo, kiu estas varma 42 celsiajn gradojn.

La kuracakvo estas malkovrita iom post 1950, kiam oni boris petrolputon. Tiu akvo estas riĉa je mineraloj, hidrokarbonatoj, sulfurkombinaĵoj, kaj ĝi enhavas ankaŭ multe da karboacido. Pro ĝia konsisto ĝi estas taŭga por kuraci mov-membrojn, reŭmatismon, ginekologiajn, intestajn kaj stomakajn malsanojn.

La gastojn atendas lueblaj domoj kaj en la feriejo, kaj en la vilaĝo. En la banloko oni povas ĝui diversajn servojn, interalie eblojn por manĝi. En la banejo estas baseno por infanoj, ŝvitbanejo, vestejoj, deĵoranta kuracisto ks. Ankaŭ vi kaj via familio estu bonvena ĉe ni!



**Urbestraro de Buzsák**

HU-8695 Buzsák, Fő tér 1.
Tel.: +36-85-530057, +36-30-3254349
Rete: buzsakpolgarm@t-online.hu
TTT-ejo: http://www.buzsak.hu
Vilaĝmuzeo: faluhaz@buzsak.hu
Banejo Csisztafürdő: +36-30-9890700

*Tiu ĉi versio estas preparita kaj eldonita en kadro de la EU Grundtvig-projekto "Kultura diverseco kaj multlingvismo en Eŭropo - kiel ni lernu pri tio?" - ref.: GR-LP-2013-124. – Tiu ĉi projekto estas subtenita de la Eŭropa Komisiono. La enhavo ne nepre spegulas la opinion de la Eŭropa Komisiono. – A projektet az Európai Bizottság támogatta. A kiadványban megjelentek nem szükségszerűen tükrözik az Európai Bizottság nézeteit.*

TEMPUS KÖZALAPÍTVÁNY

Az egész életen át tartó tanulás programja